# Vin, Vin, Plejalta, mi prikantos

## DIR, DIR, O HÖCHSTER, WILL ICH SINGEN




2. Al Via Fil', min, Patro, tiru,
por ke la Filo tiru min al Vi.
Spirito Via min inspiru,
kaj regu en raci' kaj emoci',
ke gustumeblu Via pac' en mi,
kaj tial kantu mia kor' al Vi.

3. Al mi, Plejalta, Vi afablu,
ke pie kantu mi, kun kor-sincer'.
La bela son' al Vi agrablu,
dum mi adoras laŭ spirit' kaj ver'.
Tiele Vi min levos al la glor',
ke psalmu mi al Vi en alta ĥor'.

4. Por mi Spirito Via pledas,
neeldireble ĝemas Li en mi,
kaj helpas, ke mi dece petas,
atestas, ke mi estas id' de Di'.
Mi estas heredant' kun Krist' Jesu',
kaj preĝas «Aba, Patro» sur genu'.

5. Kaj tian preĝon Vi elaŭdos,
ĉar mi ĝin faros laŭ Spirit-instru',
laŭ Via propra vol' mi laŭdos
Vin en la glora nom' de Krist-Jesu'.
Per Li heredos, kiel Di-infan',
abundan gracon mi el Via man'.

6. Ateston bonan Vi eldiras.
Per ĝi mi estas plena de konsol'.
Ĉar ĉion, kion mi deziras,
ricevos mi el Via bona vol'.
Kaj eĉ pli multon donos Vi al mi
ol ajne povus peti mi de Vi.

7. Do en la nom' de Via Filo,
kredante Vin, mi preĝas antaŭ Vi.
Por mi ĉe Vi en Dia brilo
fidele kaj konstante pledas Li.
Pro tiu ĉi feliĉo estu glor'
al Vi eterne, laŭdo kaj ador'.

DIR, DIR, O HÖCHSTER, WILL ICH SINGEN • EG 328 • RG 243 (4-voĉa: Dir, dir, Jehova, will ich singen) • EM 36 (4-voĉa) • M: Hamburg 1690, Halle 1704 • germana T: Bartholomäus Crasselius 1695 • E: Albrecht Kronenberger (strofoj 1 kaj 2 kun Christa Koss) 2004